

ADORU 155

1. Ri - po - zas nun ar - ba - roj,
2. La su - non, ki - u he - lis,
la ho - moj, kam - poĵ, ma - roj.
la nok - to jam for - pe - lis,
Dor - ma - das te - ra glob'.
de l' ta - go mal - a - mik'.
Ek! Mi - aj sen - soj, spri - tu!
For - i - ru! Sun' a - li - a,
Ko - men - cu, ki - on vi - du
Je - su - o, ĝo - jo mi - a,
kre - in - to vi - a kun a - prob'.
bri - la - das nun en mi - a psik'.

3. Pasinta tago foras
kaj brilaj steloj oras
en blu-ĉiela hal'.
Min Dio tie lokos,
se baldaŭ Li min vokos
al Si el la mizera val'.

4. La korpo dormon petas,
vestaĵon mi demetas:
de l' pereec' simbol';
se ili ne plu estos
necesaj, Kristo vestos
min per honora aŭreol'.

5. Nun ĝojas la organoj,
piedoj, kap' kaj manoj;
finiĝis la labor'.
Kor', ĝoju, ĉar libera
de la mizero tera
Vi estos, kaj de l' pek-angor'.
6. Nun iru, membroj lacaj,
kaj vin kuŝigu pacaj
en lito laŭ dezir';
Sed iam horo venos
kaj vi ripozon prenos
en tombo post la lasta spir'.
7. Okuloj jam hezitaj
ja estos tuj fermitaj;
do kie mia cel'?
La korpon kaj animon
protektu kaj ne krimon
allasu, gard' de Izrael'!
8. Jesuo, nun etendu
flugilojn ambaŭ, sendu
ripozon al teran'.
Satanon for-komandu.
Anĝeloj Viaj kantu:
«Ŝirmata dormu ĉi infan'.»
9. Vi ankaŭ, ho gefratoj,
ne estu minacatoj
per iu ajn danĝer';
vin gardu dum la dormo
en ora uniformo
anĝeloj Diaj por prosper'.

NUN RUHEN ALLE WÄLDER • EG 477 • RG 594 kaj EM 633 (izometra
melodi-versio) • M (Innsbruck): 15a jc.; Heinrich Isaac (ĉ. 1495) 1539; religie
Nürnberg ĉ. 1505, EG 84, EM 209 • germana T: Paul Gerhardt 1647 • E:
Helmut Rössler, 1985 en Germana Antologio p. 284-285, 8a strofo: Adolf
Burkhardt 1987 en TK 158 • † Mat 11,29